

La rasismo, 3-a parto  
Claude Gacond, 91-a radioprelego, 1964.08.26 & 29

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la rasismo. Vi aŭdas Claude Gacond.

La du pasintajn semajnojn ni ekzamenis gravan tekston de Martin Luther King verkitan en 1962. Ĝi koncernas la uzon de neperforto por la ĉesigo de la rasapartigo en Usono. Ni memorigas al vi, ke reverendo Martin Luther King junulo estas unu el la gvidantoj de la kampanjoj, kiujn la nigruloj organizas por akiri siajn civitanan kaj socian egalecon kun la blankuloj.

Koncerne sian neperfortan kampanjon Martin Luther King skribis : « *Ni alvenis al la periodo, kiam ni povas diri al tiuj, kiuj uzos eĉ perforton por kontraŭstari al ni : ni kapablos tiom bone elteni la suferon, kiom vi ĝin trudis al ni. Al via fizika forto ni kontraŭdonos nian animan forton. Faru kun ni, kion vi volos, ni vin ĉiam amos. Ni ne povas plenkonscie obei al viaj nejustaj leĝoj, ĉar la nekunlaboro kun la malbono estas morala devo, kiel la kunlaboro kun la bono. Malliberigu nin, kaj ni vin ĉiam amos, ĵetu bombojn kontraŭ niajn domojn, minacu niajn infanojn, eĉ se tio estos por ni malfacila, ni vin amos ĉiam. Sendu en niajn urbojn dum la meznokto viajn perfortemulojn kun kapuĉmanteloj, tiru nin el niaj domoj por nin konduki sur foran vojon, frapu nin, forlasu nin duonmorte, ni vin ĉiam amos. Estu certaj, ke ni vin elĉerpigos per la rimedo de nia suferkapablo kaj ke iun tagon ni gajnos nian liberecon. Ni ne nur gajnos nian propran liberecon, ni estos vokintaj tiom multe al via koro kaj al via konscienco, ke ni vin venkos en la disvolviĝo de la okazaĵoj.*

*Tio estas nia mesaĝo. Estas tio, kion ni provas komprenigi al la aliaj. Mi kredas, ke tiu vojo nin kondukos al nova glora tago. Tiu vojo malebligos la nigrulojn eniri kun amaraj sentoj en la novan epokon. Ĝi malebligos nin eniri en la novan epokon serĉante redoni la ofendojn kaj nin venĝi sur tiujn, kiuj nin devigis vivi dum jaroj sub premado kaj maljusteco. Ĝi malebligos la nigrulojn provi de suba pozicio leviĝi al supra pozicio por el tie renversi la justecon kaj substitui tiranecon al alia tiraneco. Mi asertas, ke la nigra superregado tiom danĝeras, kiom la blanka superrego. Dio ne nur interesiĝas al la libereco de la nigruloj, de la mestizoj aŭ al iuj ajn aliaj homoj. Dio interesiĝas al la libereco de la homaro entute kaj al la kreado de societo, en kiu ĉiuj homoj frate kunvivados kaj en kiu ĉiu homo respektos la dignecon kaj la valoron de la homa persono. Jen la celo de nia kampanjo. Jen la societo, kiun ni devas establi en Usono. Sed ĝi nur venos, kiam sufiĉe da homoj sin levos por vivi la bonvolemajn fortojn, cele al justeco kaj lojaleco.*

Tiu kampanjo de la usonaj nigruloj sub la gvidado de reverendo Martin Luther King junulo rememorigas la luktadon de la hindoj sub la gvidado de Mahatmo Gandhi. En tiu epoko oni pensis en Okcidento, ke la gandhia luktometodo estis pruvo de malforto. Poste oni asertis, ke neperforto taŭgas por orientanoj. La nunaj okazaĵoj pravas, ke tiu luktometodo ankaŭ konvenas al Okcidento.

Du jarojn post la liberiĝo de sia lando pandito Jawaharlal Nehru, dum vojaĝo tra Eŭropo, vizitis la prezidanton de Svislando, sinjoron Nobs. Edmond Privat, kiel amiko de Gandhi kaj Nehru, estis invitita ĉeesti la renkontiĝon. Li interese raportas siajn impresojn en artikolo, kiu aperis la 6-an de majo 1949 en la socialista gazeto **Le Peuple**. « *Kiam pandito Nehru rapide grimpis la ŝtupojn, skribas Edmond Privat, inter la pedeloj kun dornkornaj ĉapeloj, lia blanka ĉapo kaj la granda flago verda, blanka kaj oranĝa pendigita apud la federala standardo igis la publikon kaj la ĵurnalistaron realigi, ke la hieraŭa utopio estis hodiaŭ fakto efektivigita. Hindio estis libera, granda ŝtato kun tricent milionoj da animoj, ŝtato baldaŭ fariĝonta respubliko. Kiu tion povis kredi ĉe ni antaŭ dek jaroj ? ekkrias nia samideano, kiu ĉiam defendis la kaŭzon de la subpremitaj landoj. Kaj li aldonas, pensante al kritikoj, kiujn li rikoltis : Ĉu ni ne estis revuloj je la okuloj de la granda amaso de la skeptikuloj ? La mondo ŝanĝiĝas, kaj tio rapide. »*

La rasismo, 3-a parto  
Claude Gacond, 91-a radioprelego, 1964.08.26 & 29

Edmond Privat ankoraŭ rakontas, ke « *en sia respondo al la prezidanto Nobs, kiu parolis pri la Mahatmo, Nehru esprimis sian konvinkon, ke la rimedoj gravas tiom multe, kiom la celoj, kaj ke se ili estas malbonaj, ili fine prenas la lokon de la celoj, kaj ilin detruas. Malamo kaj perforto vekas venĝemon kaj rankoron. Estas ensorĉita cirklo, el kie oni povas eliri nur elektante alian vojon.* »

Edmond Privat aldonas al tiuj gravaj vortoj de Nehru : “*Estis kuraĝige aŭdi realiston, kiel Nehru, fari tiujn konstatojn bazitajn sur travivaĵoj.* »

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond parolis pri la rasismo.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-